

4 ☆ 1994 ☆ 161

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



SET Lančov 1994: instruĥoro de kantado

NIAJ TENDAROJ: SET LANĈOV

Nuntempe funkcias en Ĉeĥa Respubliko minimume kvar Esperanto-tendaroj:

Nekvasovy en la okcidenta Bohemio (organizas EK Plzeň), **Klánovice** en la meza Bohemio (de junulara sekcio), **Sebranice** en la orienta Bohemio (katolika sekcio) kaj **Lančov** en la suda Moravio (EK Třebíč).

Se vi konas ankoraŭ pluajn, bonvolu informi nian redakcion kaj legantaron.

Ni deziras en Starto laŭvice prezenti ĉiujn tendarojn, se skribos al ni tiuj, kiuj travivis ilin. Ni komencos per Somera Esperantista Tendaro (SET) Lančov, kies trian etapon ĉi-jare partoprenis ankaŭ nia redakcio.

Supozeble multaj el vi scias, ke ĉi tiu plej malnova el niaj tendaroj situas ĉe baraĵlago de Vranov, 5 km de la urbo Vranov kaj 100 m de la golfo de Lančov. La tendaron ĉirkaŭas arbaro. Antaŭ dek jaroj la tendoj devis esti anstataŭigitaj per kabanjoj, ĉar tendumado estis malpermesita en la tuta regiono pro higienaj motivoj (la lago servas kiel fonto de trinkakvo). Pro la sama motivo ne plu veturas grandaj motorŝipoj, sed naĝado, boatado, ventsurfado kaj fiŝado prosperas (ĉijare unu knabo el nia tendaro kaptis kvar angilojn).

Dum la totalisma reĝimo Lančov estis nia sola permesita Esperanto-tendaro, relative malmultekosta, tial ĉiuj etapoj estis plenaj de esperantistoj. Post 1989 la ekonomia situacio altigis la partoprenkotizon kaj malaltigis la nombron de kursanoj. Aperis novaj Esperanto-tendaroj en aliaj regionoj kaj tiuj forlogis niajn samideanojn. La senkompromisa

ekonomio devigis la organizantojn enlasi en la tendaron ankaŭ la kursojn de la angla kaj germana lingvoj apud Esperanto. Cijaraj etapoj estis denove plenŝtopitaj, kun ĝis nun nevidata nombro de infanoj, sed bedaŭrinde Esperanto-kursoj restis en tute minoritata pozicio.

Dependas nur de ni, esperantistoj, ĉu Esperanto denove regos en Lančov, konstruata dum jardekoj de centoj da samideanoj, aŭ ĉu ni permesos, ke la Internacia Lingvo estu englutita aŭ forpuŝita.

La programo de la tria etapo estis adaptita precipe por la infana kursanaro. Ĉiu grupo devis prezenti iun elpensitan ŝtaton, elekti sian suverenon aŭ prezidenton kaj sian flagon, ĉiu ŝtato ricevadis ĉiutage poentojn por ordo en la kabanjoj, por rezultoj en la kursoj kaj en diversaj konkursoj. Aperis tie ŝtatoj kiel Afrika Kanibala Respubliko, JAR kun aromo de citrono, Rosmar-Ebura Bordo k.s., kies ĉefoj estis kutime reĝoj aŭ imperiestroj. En speciala programo ĉiu kurso-lando devis prezenti sian ŝtatestron, flagon, nacian himnon kaj dancon. En programo ne mankis tradicia kamavalado, "Intertalento" k.s.

Antaŭtagmeze instruado, kantado, posttagmeze banado en vere pura akvo en lago, tendarfajro, diversaj ekskursoj, vizito de Vieno kaj kulturaj programoj.

Dum la tria etapo okazis unu sola Esperanto-kurso por progresintoj kun internacia partopreno.

Por la unua semajno venis ankaŭ tri familioj (el Francio, Italio kaj Ĉeĥio), kies infanetoj - denaskaj esperantistoj - ĉarme konversaciis Esperantlingve.

-mm-

UK Seŭlo 1994 Ni revenas kun ŝildo ...

En momento, kiam mi surpaperigas ĉi komencajn vortojn, trairas min ega varmo. Ne pro ekstremaj gradoj, kiuj en tiuj ĉi tagoj regas en Seŭlo - cetere, la hotelo Sheraton, kiu por la tuta semajno fariĝis esperantista ĉefurbo kaj kie mi ĝuste sidas, estas perfekte klimatizita. Sed ekscitis min vortoj, kiujn la komitato de UEA ĝuste aŭdis el la buŝo de prezidanto J. Wells: *"La estraro decidis, ke la 81-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Prago en 1996"*.

Fine mi aŭdas vortojn, pri kiuj mi jam kelkfoje vane esperis. Aŭdinte tion, la apudsidantaj komitatoj min gratulas, sed mi eksentas internan premon kaj febreton, ĉar mi tuj ekvidas monton da laboro, kiun oni devas plenumi organizante la UK-on. Jes, la tasko estas granda, sed nia entuziasmo ankaŭ. Ni ja emis organizi mondan kongreson kaj ni jarojn atendis tiun okazon. Jen ĝi venas. Mi firme kredas, ke tiu fakto ne nur ĝojigos membrojn de nia asocio, sed ĝi instigos ilin al pli aktiva laboro, al pli profunda ekrego de la lingvo. Kaj ceterajn esperantistojn en nia lando tio eble instigos pesi sian rilaton al Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kaj ili membriĝos aŭ renovigos sian membrecon en ĝi. La aktiva, bone organizata kaj forta landa asocio ja estas garantio de sukcesa universala kongreso. Tri mil kongresanoj, kiujn ni atendos en Prago, meritas, ke nia organizaĵo kapablu kontentigi ilin en ĉiuj iliaj postuloj kaj certe en ĉiuj lokoj, kiujn ili - ĉu antaŭ-, post- aŭ dumkongrese - vizitos.

Do, karaj gekolegoj kaj esperantistoj en Ĉeĥio - ek al preparo de la 81-a UK!

Seŭlo 28.7.94 VI. Kočvara

Sukcesa 79-a UK en Seŭlo

La 79-a UK allogis en Seŭlon preskaŭ du milojn da esperantistoj el 66 landoj. Ĉi okaze plej multis azianoj - do koreoj, japanoj, ĉinoj, sed ĉeestis ankaŭ kongresanoj el landoj tute sporade reprezentataj - Nepalo, Kamboĝo, Srilanko, Hong-Kongo ... El aliaj landoj vidigis kutimaj kongresanoj el okcidenta Eŭropo, nur unuopuloj el aliaj Tero-sferoj. Inter tiuj 2 el Ĉeĥio (la tria estis dlande loĝanta V. Barandovská-Frank). La aliaj el la 11-membra "ĉeĥa" karavano estis eksterlandanoj (4 germanoj, 2 aŭstroj, 1 franco, 1 hispano).

La kongresejo estis vere luksa hotelo kun kongresa centro "Sheraton Walker Hill". Kompreneble, ke al nivelo de la hotelo adekvatis ankaŭ prezoj, kvankam speciale por kongresanoj en aparta manĝejo rabatitaj (kafo 500 vonoj = 1 DM, biero 2000 vonoj). Sed labor-kondiĉoj por kongresumado ekstreme konvenaj.

La programo de la kongreso estis kiel kutime bunta, allogaj por ni estis ĉefe kulturaj programoj prezentataj la korean kulturon. Okaze al la kongreso aperis esperantlingvaj informiloj pri Koreio, speciala korespondkarto por kolektantoj, estis uzita okaza poŝta stampilo rekte en la kongresejo ĉe speciala giĉeto. La komitato de UEA kunvenis kvarfoje. Multon oni traktis, ne en ĉio estis atingita ĝenerala konsento. Estis nomumita nova ĝenerala sekretario de UEA - M. Fettes anstataŭ retiriĝinta

I. Jackson. Denove estis iomete altigita UEA-kotizo de individua membro, ekde nun pagos la kongreskotizon ankaŭ komitatanoj, kvankam 50% rabatitan. Oni multe preparolis movadon en estintaj "soclandoj" kaj estis konstatite, ke malgraŭ gravaj problemoj estas tieaj movadoj en stato de "modera optimismo". Komprenoble, ke mi detale informis la komitaton pri nia situacio kaj iom mi menciis ankaŭ situacion en Slovakio.

Dum la ferma ceremonio estis menciitaj deciditaj lokoj de estontaj kongresoj: Prago 1996, Adelaido 1997. Ambaŭ lokoj estis akceptitaj kun aplaŭdo de kongresanaro. Ĉijare ĉesis sian vivon ankaŭ la granda kongresa flago kaj por Tampereo 1995 estis transdonita jam la tute nova, kiu post du jaroj venos ankaŭ en Pragon. La kongreso akceptis unu rezolucion, kiun ni publikigas aliloke.

Nu, estus multe por rakonti pri Seŭlo - giganta 11-miliona urbego kun ekstremaj diferencoj diversflankaj, aŭ pri la posta vizito de Japanio kaj Tokio, kiun la karavano faris. Sed ja mi ne malŝparu la lokon de Starto. Interesulojn mi povos informi dum pluraj renkontiĝoj, kiuj nin dum plej proksima tempo atendas.

VI. Kočvara



ESPERANTISTOJ UNUAROJE MONDKONGRESAS EN KOREIO

La temo de la kongreso "Azio en la mondo" montriĝis aparte trafa en momento, kiam la mondo streĉite atentis la situacion en la korea duoninsulo. D-ro Young-hun, prezidanto de la Korea Nacia Ruĝa Kruco, eks-ĉefministro de la Korea Respubliko, en sia inaŭgura parolo la 24-an de julio alte taksis la signifon de la kongreso, al kiu venis multaj esperantistoj malgraŭ "la minaco de la ekspluatado de nukleaj armiloj fare de Norda Koreio".

La temon oni traktis en grandnombraj prelegoj, diskutoj kaj laborgrupoj, inkluzive de lekcioj de la Internacia Kongresa Universitato. Kun ĝojo oni konstatis la kreskantan emon de la aziaj socioj rekte, interkontakte ekkoni unu la alian ekster la truda kaj ofte erariga perado de la "okcidentaj" amaskomunikiloj. Tiu emo paralelas la centjaran tradicion de la Esperanto-uzantoj tra la mondo kontakti unu la alian senpere, trans limoj ŝtataj kaj lingvaj. En Azio ekzemplas tion la ĉiujara Komuna Seminario inter Korea kaj Japana Junularoj esperantistaj, kiu okazas alterne en la du landoj.

La kongresa programo enhavis kunvenojn de esperantistaj ekonomikistoj, medicinistoj, naturistoj, instruistoj, skoltoj, fervojistoj, religiuloj, juristoj, muzikistoj, blinduloj, radio-amatoroj kaj multaj aliaj. Aŭtoroj esperantlingvaj prezentis siajn novajn verkojn en la libroservo, kiu vendis centojn da titoloj, de la Biblio ĝis la plej freŝdataj noveloj de la juna portugala esperantisto Goncalo Neves.

En vesperoj oni spektis interalie korean

filmon kun Esperantaj surskriboj, teatraĵon kun Vida JERMAN el Kroatio, kabaredon de la Esperantia stelulino Fraŭlino BARLSTON el Britio, kaj internacian koncerton.

(laŭ kongresa cirkulero)

KONGRESA REZOLUCIO

La 79-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Seŭlo de la 23-a ĝis la 30-a de julio 1994 lun 1776 partoprenantoj el 66 landoj,

konsiderante la gravecon, kiun havas paco en la korea duoninsulo ne nur por la paco de Azio, sed ankaŭ por la paco de la tuta mondo,

konsiderante ankaŭ, ke la komuna, neŭtrala kaj facile lernebla internacia lingvo Esperanto jam pruviĝis utila por faciligi la internacian kaj interhoman komunikadon,

1. esprimas la esperon, ke la korea duoninsulo estos "zono paca", kiu estu modelo por la paco ne nur en Azio, sed ankaŭ por la tuta mondo;

2. alvokas, ke la registaroj de Suda Koreio kaj Norda Koreio ne nur permesu sed ankaŭ kuraĝigu la interkomunikadon kaj intervizitadon de individuoj en la du Koreioj; kaj

3. rekomendas, ke la registaroj de ĉiuj landoj subtenu strebojn de ĉiuj organizoj, movadoj kaj registaraj instancoj, kiuj celas antaŭenigi la interpopolan komunikadon, uzante interalie ankaŭ Esperanton.

Printempa renkontiĝo de FS ĈEA en Opava

Silezia urbo Opava gastigis printempe (15/17.4.1994) ĉeĥajn E-fervojistojn dum tradicia Printempa renkontiĝo. La vendredan interkonan vesperon riĉigis muzikistoj inĝ. Jan Kovařík kaj d-ino Eva Kopečná same kiel videoprogramoj pri la 44a IFEF-kongreso en Olomouc 1992, pri la 20a datreveno de ĈEA en Havířov 1989 kaj pri IES en Slovakio. Sabate oni buse vizitis Monumenton de la militoperacio Ostrava, teritorion de la ĉeĥoslovakaj fortikaĵoj ĉe Hlučín-Darkovičky kaj Monumenton de la silezia rezistbatalo en Ostrá Hůrka. Posttagmeze inĝ. Jan Hynčica prelegis pri evoluo de la fervoja trafiko en fervojnudo Opava, dum vespera danc-amuzo muzikis Opava Kvarteto. Dimanĉe inĝ. V. Kočvara ĉiĉerone prezentis la historiaĵojn de Opava.

46-a IFEF-kongreso en Krems

En la tagoj 14.-20.05.1994 kongresis en la antikva aŭstria urbo Krems esperantistoj-fervojistoj, kies aktivecon pravas la fakto, ke Esperantlingvaj klarigoj aperis en fervojaj horaroj de Ĉeĥio, Danio, Hungario, Norvegio, Pollando, Rumanio, Slovakio kaj Jugoslavio.

UIC (Union Internationale des Chemins de Fer) utiligas Esperanton kiel la dekan lingvon en la nova teknika Fervojista Leksikono (la 5-a eldono), kiu baldaŭ aperos sur kompakta disko kun 11 000 terminoj! IFEF jam en 1989 sukcesis eldoni E-version de la oficiala fervojfaka terminaro de UIC.

D-ro Erwith Semmelrath, reprezentanto de FISAIC (Federation Internationale des

**UNUJ ESPERANTO-EVENTOJ
EN ĈEĤIO**

Bernard Golden

Societes Artistiques et Intellectuelles de Cheminots) emfazis en sia inaŭgura saluto, ke FISAIC enkondukis eksperimente E-on kiel la trian laborlingvon apud la franca kaj germana. Inĝ. Friedrich Tschom prelegis pri la temo **Alpa transittrafiko** (historio, nuntempo, problemoj, solvoj), estis projekciita filmo pri la transportado de kamionoj per la fervojo (Huckepack) kaj nia inĝ. Ladislav Kovář (Grégrova 44, 560 03 Česká Třebová) prezentis novan, 3-an numeron de "Fervojfaka Kajero" kun ses fakaj artikoloj.

La traktadon de la kongreso kompletigis riĉaj programoj turisma (ekskursoj al Wachau, Melk, Durstein, St. Polten, Mariazell) kaj kultura (Krems-a Ĉambromuzika Koruso kun kantoj de Brahms, Danubia Kvarteto kun komponaĵoj de Haydn, Mozart, Strauss, Lanner kaj la moderna Holik). Kvar numerojn de kongresa kuriero preparis redaktoro de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio Andreo Petryn.

La 47-an IFEF-kongreson okazigos la hungara Pecs (20/26.5.1995).

Postkongreso en Břeclav

Postkongresanoj el 17 landoj alveturis vendrede la 20-an de majo al la sudmoravia Břeclav, de kie ili sabate ekskursis al Moravia Karsto kun famaj subteraj grotoj plenaj de stalaktitoj kaj stalagmitoj kaj kun abismo Macocha [legu: macoha]. Dimanĉo estis dediĉita al vizito de urbeto Lednice (kastelo kun impona parko) kaj de Dolní Věstonice kun elfosaĵoj de praepoko (24 mil jarojn a.K.), lunde ĉiuj admiris vin-entreprenon kaj historian urban rezervejon en Mikulov.

Jindřich Tomíšek

Ĉu vi bone konas la historion de Esperanto dum ĝia frua disvolviĝo sur la teritorio de la nuna Ĉeĥa Respubliko? Jen dek demandoj por taksu viajn sciojn. Kiom da ili vi povas respondi sen helpo de informoj en konsultlibroj?

1. Kiu verkis la unuan lemolibron de Esperanto por ĉeĥoj, kaj en kiu urbo ĝi aperis?
2. Kiam estis eldonita la unua lemolibro kun vortaro. Laŭ S. Kamarýt en tiu jaro komenciĝis efektive la ĉeĥa Esperantomovado.
3. Kiam kaj en kiu urbo fondiĝis la unua klubo de esperantistoj?
4. Kiu monata gazeto por la vivo internacia kaj por la lingvo Esperanto estis eldonita de Theodor Ĉejka en Bystřice-Hostýn en 1902?
5. Kiam en Prago okazis la unua publika prelego pri Esperanto?
6. Kiam estis publikigita la unua libro en Esperanto pri Jan Hus?
7. Kiam estis fondita la unua esperantista organizaĵo por ĉeĥaj laboristoj?
8. Kiel nomiĝas la unua ĉeĥa teatraĵo, kiu estis ludita en universala Esperanto-kongreso?
9. Kiu grava internacia esperantista movado organizis sian unuan kongreson en Prago en 1921?
10. Kiam kaj en kiu urbo estis inaŭgurita la unua monumento honore al d-ro Zamenhof?



RESPONDOJ:

1. En 1890 **Úplná učebnice mezinárodní řeči dra. Esperanta**, verkita de František Vladimír Lorenc, aperis kiel aŭtor-eldono en Pardubice.
2. En 1900 en la urbo Bystřice p. H. Theodor Čejka kune kun Valentin Bilík kaj Jan Holub eldonis 188-paĝan lernilon kaj vortaron kun la titolo **Mezinárodní řeč Esperanto. Úplná mluvnice a cvičebnice se slovníkem esperantskočeským a česko-esperantským**.
3. En 1901 en Brno tipografo J. Kajš kaj ĵurnalisto Karel Pelant fondis la unuan societon de aŭstrijaj esperantistoj.
4. Ivan Seleznjov el Rusujo kaj František Sidlo, instruisto en Bystřice p. Hostýnem redaktis **Revuo Internacia**. Tiu periodaĵo estis tro bona por sia epoko kaj ne ricevis bezonatan subtenon. Nur kvin numeroj aperis inter novembro 1902 kaj marto 1903.
5. Stanislav Kamaryt prezentis la unuan publikan prelegon pri Esperanto en Prago la 21-an de majo 1904 ĉe **Ženský klub** (Virina Klubo).
6. Josef F. Khun, instruisto en Jičín, verkis **Majstro Jan Hus. La vivo, agado kaj kondamno kaj morto de l' glorinda martiro**. Tiu ĉi rakonto estis bazita sur populara libreto por infanoj. Post publikigo de la Esperanta versio en 1905, aperis en 1920 la sama verko en Ido.
7. En 1911 Jiří František Chaloupecký fondis Laboristan Unuiĝon Esperantistan kiel fakon de social-demokrata kleriga societo Laborista Akademio.
8. La triakta komedio **Nokto en Karlův Týn (Noc na Karlštejně)** de Jaroslav Vrchlický estis prezentita en Prago okaze de la 13-a Universala Kongreso de

Esperanto en 1921. Tradukis ĝin Miloš Lukáš, tiam 23-jara.

9. En Prago en 1921 ankaŭ Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) organizis sian unuan kongreson.

10. Okaze de la 4-a Tutaŭstria Esperanto-Kongreso en Franzensbad (nun Františkovy Lázně), la unua monumento honore al d-ro Zamenhof estis inaŭgurita la 1-an de junio 1914.

Eva Jelínková pri tradukado de Spartako verkita de J. Loukotková

Min interesas la tradukado praktike - mi simple tradukas, sed teorie pri tio prelegi, tion mi ne kapblas. Cetere mi plimulte fidas je inspiro ol je teorio, kvankam mi tre volonte legas tiajn artikolojn kiel "La plej malfacila arto" de W. Auld. Mi persone konsideras tradukadon - almenaŭ la mian - certa speco de mensa malsano. Simple helpe de la ĉeĥa teksto mi kvazaŭ transportas min al la antikva Romio, kaj tion, kion mi vidas, mi esprimas en Esperanto. Mi ne tradukas vortojn, kiujn laŭ la verkistino Loukotková diras ekzemple Gavius, pli precize mi imagas min Gavius, kiu parolas Esperanton. Tial vi jam certe komprenas, kial mi nomas tradukadon mensa malsano. Cetere ne estas precize, ke mi transportas min en la antikvan Romion helpe de la ĉeĥa teksto, ĉar la ĉeĥajn vortojn mi praktike ne perceptas, same kiel ne perceptas ilin normala leganto dum legado. La vortoj estas nur rimedo, per kiu estas esprimita certa situacio, bildo, emocio, kaj mi tradukas pli tiujn situaciojn,

birdojn, emociojn ol la vortojn. La vortaron mi uzas nur por kontroli, sed neniam por traduki, ĉar tio min misgvidus al laŭvorta traduko.

Eble vi pensas, ke dum tradukado ne sufiĉas imagi situacion sen stilo de aŭtoro. Certe. Tamen, kio estas tiu aŭtora stilo? Ĉu vortoj de aŭtoro aŭ liaj ideoj? Ĉu finfine aŭtoro ankaŭ ne uzas vortojn nur kiel rimedon por esprimi sian imagon, opinion, koncepton? Se mi skribas, ke mi dum tradukado kvazaŭ estas en antikva Romio, mi ja ne estas tie dank'al mia sperto aŭ miaj konoj, mi ja neniam vizitis Romon. Mi do povas ĝin atingi per mia fantazio nur helpe de la aŭtorino, de ŝiaj imagoj pri tiu ĉi mondo. Ĉu do identiĝo kun la priskribita mondo - priskribita fare de aŭtoro - fakte ne garantias jam per si mem fidelon al aŭtora stilo?

Okazis dum la lastaj jaroj, ke el ĉeĥa literaturo iom post iom malaperis ĉiuj signifoplenaj verkoj. Ĉio, kio esprimas ian gravan ideon, ian verecon, ian novan vidpunkton de nia mondo, estis silente forigita. Mankon de ideoj oni kompensas per pli granda atento al vortoj. Oni elektas iun banalan temon, kaj - por kaŝi ĝian banalecon - esprimas ĝin per nekutima vortprovizo. Ju pli konfuza, des pli arta. Anstataŭ literaturo, kiu devenas de la realo kaj esprimante ĝin denove revenas al ĝi kaj ĝin influas, venas vortismo.



Ekzistas literaturaj verkoj, kiuj priskribas mondon absolute fantazian kaj tamen vi sentas ilin veraj, ĉar ili esprimas verecon de homa timo aŭ sopiro aŭ ĝojo... Ekzistas verkoj, kiuj kvazaŭ realisme fotografas la realon, kaj tamen vi sentas ilin mensogaj, ĉar ili ekzemple ŝajnigas entuziasmon, kie homoj sentas nur indiferecon aŭ eĉ mokemon. Vi povas kompari, kiel priskribas militon verkisto kaj kiel priskribas ĝin historiisto. Se historiisto okupiĝas pri strategio, atakoj, venkoj, malvenkoj, ekonomiaj aŭ ideologiaj aŭ naciaj kaŭzoj de la milito, tiam verkisto

esprimas timon de la homoj, kompaton al la viktimoj de la milito, sopiron al la paco...

Ofte verkoj de la sama aŭtoro stile diferencas unu de la alia. Sed ĉu ne estas tial, ke la aŭtoro priskribas ne sin mem, sed ke li identiĝis kun heroo de sia rakonto?

Finfine tiel nomata literatura stilo ne estas invento de verkistoj, sed tute ordinara realaĵo. Ĉiu homo uzas alian stilon, se li kverelas kun edzino, alian, se li instruas infanon, alian, se li rakontas al infano fabelon, alian, se li prelegas antaŭ publiko, alian, se li amindumas. Alie rakontos pri la stacidomo homo, kiu de ĝi ekveturas al feria ekskurso kaj alie rakontos pri la sama stacidomo homo, kiu revenanta el laboro tie lace atendas malfruiĝintan trajnon. Tamen neniu el ĉi tiuj homoj konsideras sin verkisto kaj neniu pri-

pensas, kiajn vortojn li devas uzi. Diversaj stiloj de la aŭtoro dependas ĝuste de la diversaj situacioj, kiujn li priskribas, aŭ de diversaj vidpunktoj de liaj herooj, kun kiuj li identiĝis. Mi konvinkitas, ke same kiel aŭtoro sukcesas identiĝi kun siaj herooj, same devas kun tiuj herooj identiĝi ankaŭ tradukanto. Mi povas dum tradukado elekti nek stilon, nek vortojn. Tiuj estas donitaj. Eĉ se ekzistus dudek sinonimoj, nur unu el ili povas en Esperanto esprimi tiun konkretan koncepton, kaj ĝuste tiun vorton mi devas trovi. Alian eblecon mi ne havas.

Ĉiu literatura verko, krom rakonti fabelon, havas ankaŭ alian celon. Nĕmcov deziris en Avinjo esprimi siajn rememorojn al infaneco, tial la tuta libro estas idilia, serena, trankvila. Hašek en Aventuroj de la brava soldato Ŝvejka male deziris esprimi stultecon de la milito kaj uzas konformajn stilistikajn rimedojn por tiu celo. Iom akra vorto en Avinjo eksplodis kiel bombo, ĉar ĝi kontraŭis la tutan etoson de la verko. La homo ne kutimas blasfemi, sentante ĝojon kaj trankvilon. Sed ne nur en Avinjo, estus tia vorto nenatura. Same nenatura ĝi estus en multaj rakontoj de Hašek. Verkisto do ne uzas sian stilon laŭplaĉe, sed konformigas ĝin al la celo de sia libro. Ĉi tio estas ankaŭ afero, kiu ni povas konsideri, kiam vi pripensas, kiun verkon vi tradukos. Eĉ la plej interesa libro povas fariĝi teda, se vi okupiĝas pri ĝi dum kelkaj jaroj. Tial estas multe pli facile traduki verkon, kiu ne nur plaĉas al vi, sed kun kiu vi ankaŭ konsentas.

Mi opinias, ke inter komuniza kaj literatura stiloj ne estas esenca diferenco, diferenco estas nur en tio, ke

la literaturisto pli bone konas la lingvon, dediĉante pli multan tempon al ĝia studado. Tial ankaŭ tradukito devas studi stilistikon, tradukteorion ktp. Sed mi opinias, ke al tiuj studoj venos ĉiu tradukanto mem, se ne pro alia, do almenaŭ por ŝpari la tempon. Pretendi, ke mi mem inventos ĉiujn stilistikajn kaj lingvajn nuancojn de Esperanto estus same naive, kiel pretendi, ke mi mem plantos arbon kaj el ĝia ligno fabrikos paperon, sur kiun mi tajpas mian tradukon. Same, kiel estas por mi multe pli facile aĉeti pretan paperon, tiel estas multe pli facile ankaŭ studi, kiel tiun aŭ alian tradukan problemon solvis aliaj tradukistoj, ofte pli spertaj ol mi mem.

Mi ne timas, ke iam aperos amaso de senrespondecaj tradukoj, pro manko de prilingvaj teoriaj studoj. Estas ja nature, ke tradukadon entreprenas kutime homoj, kiuj ŝatas okupiĝi pri la lingvo kaj deziras studi ĝin. Homo, kiu ne interesiĝas pri tiuj studoj, baldaŭ rezignos la tradukadon. Precipe en Esperantujo, kie tradukiston minacas nek gloro, nek mono. Mi spertis tion, kiam mi provis tradukadi el Esperanto en la ĉeĥan. Mi devis rezigni, ĉar mi baldaŭ konstatis, ke mi ne konas sufiĉe la ĉeĥan lingvon por esprimi tiun aŭ alian koncepton.

(Eva Jelinkov bedaŭrinde en 1991 tragike mortis kaj ŝia traduko ĝis nun ne estis trovita)



MUZEO DE POŝTKARTOJ

En la distrikta urbo Svitavy vi trovos simpatian subtegmentan muzeon de poŝtkartoj. La unua parto de ekspozicio enhavas kaj montras historion de poŝtkartoj. Samtempe la plej malnova estas tiu el la jaro 1884. La dua parto de la ekspozicio estas laŭsezono ŝanĝata. De la 1-a de julio ĝis la 18-a de septembro regas la temo LIBERTEMPO.

ATENTU! Estas aranĝata ekspozicio "ESPERANTO kaj la mondo". Ĝi efektiviĝos de la 1-a de marto ĝis la 16-a de aprilo 1995. Jam nun estas preparitaj preskaŭ 300 da diversstemaj poŝtkartoj rilatantaj al Esperanto.

Vizitu la ekspozicion kaj eble por pliriĉigi ĝin sendu iun E-poŝtkarton al: **František Molík, Zákoutí 269, 547 01 Náchod.**

Vi povas sendi ankaŭ neesperantajn poŝtkartojn por temoj "urboj, naturo, bestoj, ŝercoj" ktp. rekte al la muzeo: Orbis Pictus, Květuše Veselá, Bezručova 24, 568 02 Svitavy.

LA TRIA UNESKO-REZOLUCIO NE APROBITA

En Starto 1/2/1994 ni informis, ke - laŭ E-gazetaro - en novembro 1993 akceptis Unesko trian rezolucion favore al Esperanto laŭ iniciato de Esperanto-Radikala Asocio. Bedaŭrinde montriĝis, ke la informo estis erara: la rezolucio estis nur proponita, tamen Unesko ĝin ne aprobis.

Deziro fariĝis patro de la ideo, iu el la redaktoroj miskomprenis la sciigon kaj aliaj la miskomprenon ripetis. Korekton alportis Heroldo de Esperanto.

Ni rekomendas:

ALĜU AL KORESPONDAJ KONVERSACIAJ RONDOJ!

Komence de la lermojaro 1994-1995 startas korespondaj konversaciaj rondoj por ĉiuj interesatoj, kiuj volas perfektigi en Esperanto. Inter partoprenantoj de unu rondo cirkulas kasedo kun rakontado en Esperanto. Post aŭskultado de la kasedo la unua partoprenanto sendas la kasedon al la dua, tiu al la tria ktp., ĝis la kasedo revenas al la respondeculo, kiu gvidas la rondon kaj cirkuligas la kasedojn. Se vi deziras partopreni, havigu al vi kasedan magnetofonon kaj skribu al la respondeculino: **Mgr. Vlasta Janáková, Smetanova 26, 541 01 Trutnov.**

Skribaj korespondaj kursoj

Se vi ne posedas magnetofonon, ne forgesu, ke nia asocio preparis ankaŭ skribajn korespondajn kursojn, ne nur por komencantoj, sed ankaŭ por progresintoj.

Skribu al **Český esperantský svaz, p. s. 1069, 111 21 Praha 1.**

Korespondi deziras:

70-jara franco volus interŝanĝi poŝtmarkojn: **Pierre Blohin, 41, Av. Anatole France, 92 700 Colombes, Francio**

62-jara indonezia instruisto de la angla deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn: **Sri Soedono Pr., Jl. Suryoputran 41, Yoguakarta 55131, Indonezio**

Akademia kolokvo

La unua kolokvo de la Akademio de Esperanto (AdE) okazis en Prago 1994--07-07/14. Bedaŭrinde ĝia inicianto kaj prezidanto de AdE D-ro André Albault lastmomente devis rezigni pri la persona partopreno pro forta malboniĝo de sia sanstato.

La kolokvon, kiun aranĝis komisiite de AdE la eduka entrepreno de Petro Chrdle KAVA-PECH, partoprenis 37 partoprenantoj de 11 landoj. Post la inaŭguro fare de la vicprezidanto de la Akademio D-ro Werner Bonmann (DE) praga akademiano Eli Urbanová prezentis kelkajn de siaj lastaj poemoj kaj la kolokva sekretario D-ro Petro Chrdle tralegis salutvortojn kaj fragmentojn de la leteroj de pluraj akademianoj kaj ceteraj elstaraj esperantistoj.

Sekvis fakaj prelegoj en jena sinsekvo:

- Michel DUC GONINAZ (FR): Pri reguleco de Esperanto
- Jean THIERRY (FR): R. Schwartz, la vortojonglisto
- Christer KISELMAN (SE): Transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto
- Detlev BLANKE (DE): La konkurantoj de Esperanto
- Detlev BLANKE (DE): La enciklopedia vortaro de E. Wüster
- Werner BORMANN (DE): Defio faklingvo
- Rüdiger Eichholz (CA): Fakaj terminoj en ĉiutaga vivo
- Karl-Hermann SIMON (DE): Lexikon silvestre - novspeca eldono en la fortfaka literaturo
- Judith JACKSON (prezentita de Ian

Jacson) (DE/GB): Bestoj en la taksonomia ĝangalo

- Petr CHRDLÉ (CZ): Specifaj trajtoj de la sciencaj kaj teknikaj verkoj en Esperanto

- Marie BARTOVSKÁ (CZ): Teksumo kaj Esperanto

- Alicja LEWANDERSKA (PL): Sociaj taskoj en Esperanto

- Petr CHRDLÉ (CZ): Spertoj de profesia uzo de Esperanto

- Wim DE SMET (BE): Nova biologa nomenklatur.

Ĉiujn ĉi prelegojn enhavos prelegokolekto, kiu aperos libroforme en supozata amplekso de 180ĝis 20paĝoj ankoraŭ dum 1994 en eldoneja fako de KAVA-PECH.

Petro Chrdle

MEMORTABULO DETRUITA

En la jaro 1991, dum la internacia renkontiĝo de E-handikapuloj en Františkovy Lázně oni konstruigis kaj inaŭguris la memortabulon surloke de la iama (unua en la mondo) monumento de D-ro Zamenhof, konstruita junio 1914 dum la IV-a tiam Tutaŭstria E-kongreso. Bedaŭrinde la 10-an de junio 1994 iu ebria juna knabaĉo la memortabulon disrompis.

Hazarde li estis kaptita, sed cirkonstancoj montras, ke li ne kapablos pagi la novan. Por esperantistoj ekaperis dilemo: ĉu ni sukcesos iamaniere gajni bezonatan monon por reinstali novan memortabulon aŭ forgesi, ke iam iu monumento aŭ memortabulo sur tiu loko estis.

red.

Laste aperis:

Ne ĉiu leganto de Starto havas eblon legi eksterlandajn E-gazetojn, kaj multaj el vi verŝajne scivolos, kiaj gravaj libroj aperis ĉijare en Esperantujo. Ni menciuj la plej gravajn, mendeblajn ĉe la libroservo de UEA:

Baha-a preĝlibreto. Zurich 1993, 24p (5,70 gld)

La Balado de Prizono Reding/The Ballad of Reading Gaol. Poemo. Oscar Wilde, tr. L.H.Knoedt, Chapecó 1993, dulingva, 77p (12 gld)

La Bela planedo. Demandu kaj respondu! Charlotte Kohrs, paroligaj tekstoj por infanoj, San Diego 1993, 21p (2,10 gld)

Ekvilibrataj arboj. Prezento de algoritmoj por tiu datumstrukturo. Lepsiko 1993, 18p (6,60 gld)

Faru la kontrolon! + Solvoj. Speciala instrumaterialo por perfektigaj kursoj. Andreo Cseh, Den Haag 1993, 60+26p (45 gld)

Hanako lernas Esperanton. Lernolibro. Doi Ĉieko, Jokohamo 1993, 139p (19,50 gld)

Instrui Esperanton por komuniki. Skizo pri la komunik-situacia instrumetodo. Catherine Samain, Beauville 1993, 15p (2,10 gld)

Komentario pri Ekzercaro de Esperanto de L. L. Zamenhof. Nakamura Teruo, japane, Kameoka 1993, 166p (49,20 gld)

Kukobakado. Terminoj, receptoj, enigmoj, ludoj, taskoj. Lepsiko 1993, 34p (5,40 gld)

Parabolo pri la cisterno. Kontraŭkapitalisma satiro. Eduardo Bellamy, Beauville 1993, 12p (2,10 gld)

Sonetoj de l' nokto/Sonetos da noite. Cruy e Sousa, el la portugala L. H. Knoedt, Chapecó 1993, 52p (9,60 gld)

Studo pri morfologia kontrasto de la korea kaj Esperanto. Bak Giŭan, Seŭlo 1991, 183p (23,40 gld)

La afliktitaj gepatroj. Kathe Koliwitz en Flandro. Pri skulptistino. Raf Seys, el la nederlanda Raymond Wylleman, Oostende 1993, 72p (18,60 gld)

Almanako Lorenz 1994, Rio de Janeiro 1994, 143p (8,10 gld)

Amkantoj. Cants d'amor. Ausias March, el la kataluna Abel Montagut, Valencia 1993, 147p (18,90 gld)

D-ro Esperanto, la homo plena de espero. Rakonto. Hanna Zamenhof-Zaruski, el la angla Senjo Umeda, Tokio 1993, 21p (10,20 gld)

Ekonomie - Finance - Monnaie. Glosaro de la Komisiono de la Eŭropaj Komunumoj 1985. tr. F. J. Braun, 1992, 64+10p (19,20 gld)

Esperanta kanzonaro. Félix Navarro Clemente, Valencia 1987, 75p (7,50 gld)

Esperanta telefaksaro. Tutmonda listo de esperantistaj telekopiil-posedantoj. D.M.Weidmann, Zurich 1993, 24p (5,40 gld)

Esperanto - amo mia. Movadaj spertoj. Maria Taŝeva, Sofio 1992, 23p (4,20 gld)

Esperanto. Eine Einführung in die moderne Umgangssprache. Herbert Mayer, Wien 1993, 144p (30,00 gld)

Knock. Komedio. Jules Romains, el la franca Pierre Corret, Paris 1993, 56p (12 gld)

Kompreni. Originalaj rakontoj. Goncalo Neves, Berkeley 1993, 55p (10,80 gld)

Gerda malaperis! /vortlisto - wordlist. Claude Piron, Berkeley 1993, 26p (6,60 gld)

- Humuraĵoj.** W. H. Simcock, tradukoj el Mark Twain, J. K. Jerome, S. Leacock, 1994, 24p (5,40 gld)
- Kemia kaj sciencetnika vortaro. Esperanta-angla-germana.** Doug Portmann, Donald Rogers, 1993, 295p (87 gld)
- Rakontoj el Vukovar.** Siniša Glavašević, el la kroata J. Rušić. 1993, 43p (9,90 gld)
- Religia literaturo en Esperanto.** Karl-Olof Sandgren, 1994, 136p (18,30 gld)
- Sen pardono.** Legajo por komencantoj. Claude Piron, Vienne 1994, 20p (3,90 gld)
- Traduku!** William Auld, 1993, 24p (3 gld)
- Aforismoj. Greneroj de saĝeco.** Eldiroj de famuloj. E. V. Tvarožek, Poprad 1992, 84p (7,50 gld)
- Afrik'amo. De blanka Afriko ĝis nigra Afriko per bicikloj.** Dimitri, 1994, 329p (42,90 gld)
- Aktoj de Internacia Scienca Simpozio "Esperanto 100-jara".** Div. aŭtoroj, 1994, 249p (38,40 gld)
- Being colloquial in Esperanto. A reference guide for Americans.** D. K. Jordan, 1992, 267p (51 gld)
- Buŝo plena je tero.** Branimir Ŝćepanoviĉ, el la serba Antonje Sekelj, Beograd 1994, 108p (17,40 gld)
- **Emilio de Smolando.** Aventuroj de petolema knabo. Astrid Lindgren, el la sveda Harold Brown, Motala 1993, 72p (15,60 gld)
- Esplorvojaĝo.** Romaneto. Jules Verne, tr. István Ertl, Paris 1994, 40p (13,50 gld)
- Facile legebla akupunkturologio. Nova klarigo de teorio kaj praktiko pri ĉina akupunkturo kaj mokso.** Zhu Bin, Voroněž 1992, 350p (15 gld)
- Humoristische trekken in de Esperanto-literatur.** A. J. Middelkoop, tr. J. P. Punt, 1994, 46p (7,50 gld)
- Kolera afero.** Ronald Cecil Gates. Antwerpen 1993, 88p (12 gld)
- Krimo kaj puno.** Romano. Fjodor Dostojevskij, trad. A. Parfentjev, Jekaterinburg 1993, 485p (48 gld)
- Let's learn Esperanto. The International Language.** P. V. Ranganayakulu, lernolibro por bharatanoj, 1993, 133p (15 gld)
- La malica komizo.** Humura romano. Wenceslao Fernández-Flórez, el la hispana F. De Diego, Jekaterinburg 1993, 166p (15 gld)
- Amikeca Reto 94-95. Socivojaĝa Servo de S.A.T.** 1994, 158p (21 gld)
- Arboj.** Arbonomoj en 6 lingvoj. Lilli Giloteaux, 1994, 16p (4,50 gld)
- La botelo kaj aliaj noveloj.** Ses noveloj. János Sárközi, Debreceno 1993, 39p (7,20 gld)
- Caro kaj ĉarpentisto.** Komika opero. Albert Lortzing, el la germana Wolfgang Loose, 1994, 66p (6,90 gld)
- Damnejoj.** Poemoj. Julius Balbin, 1992, 155p (24 gld)
- Le Défi des langues. Du gachis au bon sens.** Studaĵo. Claude Piron, Paris 1994, 335p (78,60 gld)
- El tiom da jarcentoj. Malgranda antologio de latina poezio.** Div. aŭtoroj, tr. G. Berveling, Breda 1994, 48p (21,30 gld)
- Esperantaj literoj & komputoroj.** Jürgen Wulff, Hamburg 1994, 48p (21,30 gld)
- Esperanto als Ratespass.** Gramatikaj ludoj. Ulrich Matthias, Heidelberg 1994, 37p (3,90 gld)
- Fragmentoj.** Leen Deij, Croix 1994, 56p (10,50 gld)

- La Infana raso/Araca menina.** Poezio. W. Auld, en la portugalan K.H.Knoedt, Chapecó 1992, dulingva, 160p (21,60 gld)
- Unu el ni.** Poezio. William Auld, Sofio 1992, 62p (6 gld)
- La herbo de la Virgulino.** Rakontoj. Jakez Riou, el la bretona Frédéric Le Magadure, Brest 1993, 153p (18,30 gld)
- La Plessis-Bourré kaj alhemio. Le Plessis-Bourré et l'alchimie.** André Cherpillod, Courgenard 1993, 40p (12 gld)
- Legendoj de Aŭstraliaj Aborigenoj. La Pratempo/Brolgo.** C.P.Mountford, el la angla, Brisbano 1993, 52p (10,20 gld)
- Lumu mil kandeloj.** Kantoj. Volframo Distelo, Markkleeberg 1993, 20p (5,40 gld)
- La Majstro kaj Martinelli.** Akra satiro. Georgo Kamaço, Saarbrucken 1993, 28p (12 gld)
- Nuda feino.** Erotikaj rakontoj. Leopold Vermeiren, el la nederlanda, Antwerpen 1993, 108p (25,20 gld)
- Nun kune.** Rakontoj. A.Lopez Luna, Buenos Aires 1993, 168p (9,90 gld)
- Oomoto kaj Esperanto. Opinioj de Spiritaj Gvidantoj de Oomoto pri Esperanto.** el la japana Maeda Ŝigeki, Kameoka 1993, 32p (9 gld)
- Plej bone ridas kiu laste ridas.** Sciencfikcia novelo. Eddy Flego, el la itala Pier Giorgio Soranzo, Trieste 1993, 24p (13,20 gld)
- La plej granda fenestro.** Rememoroj de BEA-prezidanto. Kiril Popov, Sofio 1992, 78p (6 gld)
- Por kio ĉapelo?** Ducento da vortoj diferencaj per ĉapelo. Josef Murjan, Tel-Aviv 1993, 26p (8,10 gld)
- Adamo kaj Eva.** Amromano. János Sarközi, Debreceno 1993, 42p (7,20 gld)
- La Respubliko.** Platono, el la helena Donald Broadribb, Matraville 1993, 4+113p (30,60 gld)
- Step by step in Esperanto.** Montagu C.Butler, El Cerrito 1991, 280p (28,20 gld)
- La vojo al revoj. Droga do marzen. Le chemin des rêves.** Poemoj por infanoj. Grazyna Maszczyńska-Góra, Krakow 1993, 188p (8,70 gld)
- A world language for one world.** John Roberts, London 1993, 24p (5,70 gld)
- Agorde. Poemtradukajoj kaj komponaĵoj.** Stefán Sigurðsson, Reykjavik 1991, 49+13p (23,10 gld)
- Blankaj aŭtoroj.** Poemoj. Kočo Racin, el la makedona Nikola Rašić, Skopje 1993, 39p (4,80 gld)
- Denaska dulingveco. Konsiloj por gepatroj.** Renato Corsetti, UEA 1993, 21p (7,20 gld)
- Esperanto-katalogo. Libroj kaj aliaj eldonaĵoj.** UEA 1994, 160p (9 gld)
- Esperanto-russkij slovar'.** Boris Kolker, Moskva 1993, 54p (6 gld)
- Esperplenaj koroj.** Verkoj originalaj kaj tradukitaj de div. aŭtoroj. Sofio 1992, 63p (9 gld)
- Fraŭlino de Scuderi.** Krimnovelo E.T.A. Hoffmann, el la germana R. Haupenthal, Iltis 1992, 76p (20,70 gld)
- Infero en aŭtuno.** Krimromano. Bernard Golden. Debreceno 1993, 46p (7,20gld)
- Izolulo. Osamljelik.** Poemaro. Div. aŭtoroj el la kroata. Zagreb 1993, 161p (23,40 gld)
- La knabino estas mia.** Teatraĵo el Afriko. Nzaniye B, Jessé Le-Prince, 1994, 52p (5,10 gld)
- Kybernetische Pädagogik. Klerigkibernetiko. Schritten 1962-1992. Band 7.** Helmar frank, Kava-Pech 1993, 1088p (78 gld)

Fervoja terminaro Esperanto-germana. Suplemento al Lexique Général des Termes Ferroviaires (UIC). Bremen 1993, 188p (23,70 gld)
La Fremdulo. Romano. Albert Camus, el la franca Michel Duc Gininaz, Parizo 1993, 142p (18 gld)
Gerda malaperis! Instruilaro. Horst Gruner, Bonn 1994, 80p (19,80 gld)
Viro en la luno. Legolibro. Ŝulco Rikardo, Paderborn 1994, 400p (51,90 gld)
Granda vortaro Esperanto-korea. MA Young-tae, Seulo 1994, 1090p (96 gld)
Guide Iltis. Bio-vinoj en Francujo. Irmi kaj Reinhard Hauptenthal, 1994, 141p (25,80 gld)
Kiel instrui Esperanton al infanoj hodiaŭ. Ton Verwoerd, Heemskerk 1993, 16p (4,80 gld)
Kolektanto de ĉielarkoj. Rakontoj kaj poemoj. Tibor Sekelj, Pisa 1992, 117p (24 gld)
Kukoklaĉo en Lepsiko. Historioj, opinioj, receptoj, ekscitiloj. lepsiko 1994, 31p (6,90 gld)
Ludovikologia dokumentaro XVI. Spikumajoj. Ludovikito, 1994, 515p (57 gld)
Verkoj de Miyamoto Masao 3. 1993, 287p (52,20 gld)
La Manifesto de Ventotene. Ernesto Rossi, Altiero Spinelli, el la itala Umberto Bracatelli, Roma 1993, 11p (4,20 gld)
Mi volas nur esti - elektitaj poemoj. Adam Szyper, el la pola Julius Balbin, Pisa 1992 (24 gld)
Specifaj kulturaj scioj de la esperantista kvazaŭetno kaj ilia respeguliĝo en la koncerna lingvaĵo. Aleksandro S. Melnikov, Rostov-Donu 1992, 106p (12 gld)

Kalejdoskopio. Lilli Giloteaux. 1994, 51p (7,50 gld)
Sub la ĉielarko. Poemoj. Papaver, Sofio 1994, 43p (7,50 gld)
Ĵamborea lingvo. J.K.Hammer, 1994, 64p (6,60 gld)
Sferoj 9. Div. aŭtoroj, sciencfikcio. 1994, 136p (18 gld)
Laŭka lum'. Geja antologio. Div. aŭtoroj, 1994, 88p (18 gld)

**Pri etnonomoj de ciganoj
 en Slovakio kaj Ĉeĥio
 Eduard Gašinec**

La cigana etno en sia disiĝo tra la multaj landoj, loĝitaj de alinacianoj, tute perdis konscion pri sia etna, lingva kaj prapatruja identecoj. Ĉi tiu neĉeestanteco de plena sameco leĝe reflektis en iliaj memnomumoj.

Laŭ lingvosciencia analizo la ciganoj devenas kaj alvenis el nordokcidenta Hindujo, el Kaŝmiro. La novhinda cigana lingvo el vidpunkto de genetika parenceco apartenas al orienta grupo de hindo-eŭropaj lingvoj, tiel nomataj satemaj, kaj strukture-tipologie estas kunmiksita lingvo, kiu estas tre proksima al orientdarda kaŝmira lingvo.

Ankoraŭ ankaŭ hodiaŭ vivas en Hindujo tute sama etna grupo, kiu ne konas niajn ciganojn kaj tie same reciproke.

Ampleksa sfero de etnonomoj de ciganoj estas motivita kaj enhavas en si markilojn, karakterizojn de la ĉirkaŭa realeco, de la loĝlokoj, de kie iliaj antaŭuloj en proksima kaj malproksima pasinteco ĵus senpere alvenis, migris. Do memnomumoj de ĉiu etnogrupo de ciganoj estas ligitaj kaj apogas sin sur nomoj de nacioj, sur kies teritorioj ili dum sia

diasporo vivis.

Unuj ciganoj, laŭ konservitaj historiaj dokumentoj, migris al **Egiptujo**, kie ili fariĝis sklavoj de faraono. Por tio, kiel de tie almigrintaj, ili estas nomitaj greke (A) tsinganoi, Giftoj, turke Ĉingani, rumane Tzigan, tigan, itale Zingaro, slovake Cigán (cigán = mensogulo, ŝtelisto), ĉeĥe Cikán, hungare Czigány, angle Gypsies (*Gipcyan), germane Ziganeur, hispane gitanos, ruse cygan.

Poste vagantaj ciganoj migris al ŝtato Valaĥujo kaj Moldavio (en la 14-a jarcento). (Vlaĥ - hungare Olah, estas ano de ĉefgento loĝanta en Valaĥujo.) Por tio ruzaj vagantaj ciganoj en Slovakio nomiĝas helpe de transprenajo el la hungara **olaski** (valaĥaj ciganoj).

Post estiĝo de Valaĥujo al nova ŝtato Rumanujo (1861) migrintaj malpuraj ciganoj de ĉi tie al Blankrusio kaj Latvujo memnomiĝis blankrusa roma (blankrusaj ciganoj) kaj lotfika roma (latvaj ciganoj) laŭ la rumanaj transprenitaj propraj nomoj: **România** = Rumanio, **români** = rumano, homo, **limba româna** = rumana lingvo. Komparu la ciganajn vortojn: Rom, Romano = cigano, romano = cigana, romaĥi ĉib = cigana lingvo.

En orienta Slovakio ĝis nun precize konserviĝis de 8-a jarcento deveninta semito-hamita formo, literatura varianto de titolo de faraono, de la antikva reĝo en Egiptujo, **farahun**, kiel memnomiĝo de ciganoj, sed ankaŭ kiel ofenda nomo, kiun uzas orientaj Slovakoj.

En regiono de Orava en Slovakio vagantaj ciganoj per veturiloj kun akvomezistaj turistaj ŝirmitaj tukoj nomiĝas **uhorskí** [cigáni] (hungaraj

ciganoj), identaj kun la valaĥaj ciganoj. En la estanteco la ciganoj el Slovakio vivantaj en ĉeĥa limzono estas nomitaj **ĉierni Slováci** (nigraj slovakoj).

La ursogvidistoj, kiuj por profiti piediras kun dresita urso de unu hispana vilaĝo al alia nomiĝas **los hungaros** (la hungaroj). En Francio estas ĝis nun disvastigita la etnonomo **bohémians**, tio signifas ciganoj, ĉar guste el Bohemio (Ĉeĥio) tra la germanaj princlandoj venis unuaj grupoj de ciganoj en Francion.

Laŭ nia opinio nova oficiala slovakaj ĉeĥa enkondukita propono de la nomo de ciganoj kiel **Rom**, **romština** (cigano, la cigana lingvo) devenanta de la rumana kaj ankaŭ hodiaŭa privata memnomumo **čokoládoví cigáni** (ĉokoladanoj) ne estas klarsencaj kaj kompreneblaj en praktiko al ĉiuj komunikantaj personoj, malhelpas kaj senorientas en komunika akto kaj ne respegulas socian konscion de hodiaŭaj slovakaj kaj ĉeĥaj uzantoj.

Ĉiuj nomitaj vortoj, kiuj signas la saman ciganan etnon ne nur supervivis sian epokon, sed ankaŭ sinsekve fariĝas apartaj monumentoj de la miljara migrado de ciganoj (romoj).

*) *GAŠINEC, E. kaj KUTLÍK-GARUDO, I. E.: Cikánske nárečia na Slovensku (Ciganaj dialektoj en Slovakio), paĝ. 95. (En:) Encyklopédia jazykovedy (Enciklopedio de lingvistiko). Bratislava, Eldonejo Obzor, 1993, 515 paĝ. Scienca redaktoro kaj ĉefaŭtoro J. MISTRÍK.*

Mi uzis ĉi tiun literaturon:

Augustini ab Hortis, S.: Von den verschiedenen Namen und Bewegungen der Ziganeur überhaupt. (En:) Kaiserlich koeniglich allergnädigst privilegierte Anzeiger. Jarkolekto V, 17 majo 1775, paĝ. 175-176.

Demeter, N. G.: Etnonimia cigan jevro-pejskoj ĉasti SSSR, paĝ. 32-33. (En:) Etničeskaja onomastika. Moskva, Akademi-o de sciencoj, 1984, paĝ. 28-35. Ĉefredaktoroj P. Š. Djarilgasinova kaj V.A.Nikonov.

Ondrejkovč, R.: O p̄ovode názvu Cigán (cigáň) a význame jeho derivát. Slovenská reč, Jarkolekto 57, 1991, N-roj 5-6, paĝ. 323.

Hubschmannová, M.: Šebková, H. Žigová, A.: Romsko-český a česko-romský kapesní slovník (Cigana-ĉeĥa kaj Ĉeĥa-cigana poŝvortaro, Praha, SPN 1191)

INTERNACIA KULTURA FESTIVALO DE ESPERANTISTOJ EN ÚSTÍ NAD LABEM (30. 9. - 2. 10. 1994)

jam la 7-a, omaĝanta al poetoj Jiří Kořínek kaj d-ro Tomáš Pumpr, allogis pres-kaŭ 60 partoprenantojn el 4 landoj (Ger-manio, Svedio, Hispanio, Ĉeĥio). Prele-goj okupiĝis pri disvastigado de kulturaj valoroj per Esperanto, kion demonstris ankaŭ la koncerta vespero kun artistoj Kateřina Kudlíková (soprano, Nacia Te-atro en Prago), Miroslav Smyčka (bari-tono), Damir Basyrov (baritono), Tomáš Fiala (tenoro), Irina Kondratenko (pia-no), Bohumila Šrutová (klarneto) kaj Eva Seemannová (deklamado).

Busekskurso al la kastelo en Benešov nad Ploučnicí reenvoje haltis en Děčín por trarigardi la urbon. Grupoj el Saksio kaj Kronach reciprokis antaŭajn vizitojn de niaj samideanoj.

OSTRAVA-PORUBA

Venis-vidis-kontentis okaze de "La 1-a E-tago en Poruba" ĉiuj 54 gesamideanoj el proksima kaj eĉ malproksima ĉirkaŭaĵo kaj Pollando (1. 10. 1994).

Iama "nigra" urbo Ostrava prezentis sin el la vidturo de Nova Urbodomo, kie en la enirsalono s-ro inĝ. Janouš klarigis al ĉeestantoj malnovan kaj novan historion de la urbo kaj regiono. La impreson plifortigis ĉefe la 2-hora vizito de la "Mineja muzeo" kun kvalita akompana prelego esperantigata de Draĥ. Kočvara.

Post la 16-a horo ni ĉiuj revenis en E-omamitan E-klubejon en Domo de pensiuloj en Poruba, tute senpage malfermita por ni dank' al la urba estraro. Por ne malsatigi la gastojn, s-inoj Nádvorníková kaj Klegová kuiris gulaŝon kaj vegetaran fungo-supon.

La ĉefan programon, prelegon pri UEA-kongreso en Seulo kun lumbildoj, fare de prezidanto de ĈEA inĝ. VI. Kočvara, preskaŭ senspire absorbis ĉiuj ĉeestantoj. Sekvis renkontiĝo de iama junularo post 40 jaroj kaj kantado sub gvido de s-ano VI. Sládeček.

Ni plenumis la moton de la renkontiĝo "Ni parolu Esperante!"

L. Klegová



Theodor Kilian 100-jara

La 26-an de septembro pasis 100 jaroj ekde la naskiĝo de Theodor Kilian, honora membro de ĈEA, kiu meritis pri radio-elsendoj de Verda Stacio en Brno, fondis Somerajn Esperanto-Tendarojn en Lančov (por kiuj li verkis lemilojn "ABC", "808 vortoj" kaj "La Mondo Rakontas"), aŭtoro de fama lernolibro "Cvičebnice esperanta" (aperis en pluraj eldonoj) kaj tradukinto de la fama dramo de Karel Čapek "Blanka malsano", kuraĝe eldonita kaj radie elsendita sursojle de la dua mondmilito. Sian domon li heredigis al Esperanto-Klubo en Třebíč, kie nun troviĝas klubejo.

"ORA AŬTUNA STELETO" 1994

En septembro okazis en nordorienta parto de Bohemio en distrikta urbo Trutnov unua esperantista infanrenkontiĝo de Ĉeĥa Respubliko. Bedaŭrinde, la partopreno ne estis tre granda kaj ne respondis al klopodo de organizantoj. El deko da invititaj infanklubejoj alvenis fine nur junaj esperantistoj el Česká Třebová kun instruistino s-ino Zdeňka Novotná. La asocian Komitaton reprezentis Vláda Hasala. Unu el niaj junaj gastoj, la 13-jara Václav Neruda, priskribas la renkontiĝon jene: "Nia trajno vendrede haltis en Trutnov. Niaj esperantaj geamikoj bonvenigis nin kaj ni disiris al familioj de infanoj - esperantistoj. Mi venis kun Matouš al familio Kloučík. Ni konatiĝis kun novaj geamikoj, kiuj gvidis nin tra Trutnov. Ni vidis la urbo-domon kun urba kroniko, palacon de HAAS, interesan muzeon kaj modernan lernejon, kie lernas niaj geamikoj. Tie ili

prezentis al ni sian programon kaj videon el sia vizito en Francio. Iomete ni eĉ kantis. Dimanĉe matene ni ĉiuj veturis en banurbon Janské Lázně. Per penda kablotramo ni 'flugis' al pinto de monto Černá, kie ni manĝis en restoracio. Poste ni revenis al niaj momentaj hejmoj kaj posttagmeze kore adiaŭis niajn novajn geamikojn."

Venontjare la renkontiĝo ripetiĝos, sepreble kun pli multaj infanoj.

Mgr. V. Janáková

Esperanto-tago en Pardubice

la sepa en sia vico (ĉijare la 24-an de septembro), fariĝis jam tradicio. En ĉiu direkto la aranĝo estis zorge preparita Esperanto-renkontiĝo dank' al prezidantino de la klubo kun ceteraj klubanoj. Aŭtobuso atendanta antaŭ la stacidomo veturigis nin je kostoj de la klubo eĉ sen alia partoprenkotizo al la renkontiĝloko sub monto Kunětická. Post agrabla promeno al romantika kastelo, parte ruino, sekvis kultura kaj labora programoj. Prezidanto de ĈEA inĝ. V. Kočvara informis pri aktualaj novaĵoj en nia movado, kaj klubaj reprezentantoj raportis pri lokaj agadoj. S-ino Janáková bildigis viziton de infanoj en Francio kaj donis modelon por laboro kun geknaboj. Muzika kaj deklama programo estis parte dediĉita je memoro pri d-ro S. Schulhof (1864-1919), pardubica civita no kaj unu el pioniroj de Esperanta poezio kun elstara kvalito. Lian nomon portas ankaŭ la Esperanta klubo, kiu eldonis modestan biografion de la eminentulo.

L.R.



ESPERANTO-TAGO DE VETERANOJ

estis aranĝita la 1-an de oktobro en Ostrava. Partoprenis ĝin ne nur veteranoj de E-kluboj el Ostrava-Poruba, Vítkovice kaj Opava, sed ankaŭ grupoj el Pollando kaj Slovakio, venis eĉ populara d-ro Ferenczy el Hungario. Ĉiuj konatiĝis kun karbominista muzeo en Landek, trarigardis la nuntempan urbon kaj vidis diapozitivojn pri UK en Seŭlo.

-vs-

Internacia E-seminario

kun temo "Nacia identeco kaj eŭropa tradicio" gastis en la bavara Kronach (28. 8. - 4. 9. 1994). Kvindeko da partoprenantaj esperantistoj el 9 landoj aŭskultis prelegojn pri pentristo Lucas Cranach la patro, pri lingvisto Johan Gaspar Zeusse, pri Paracelsus (prelegis nia prof. V. Novobilský) kaj pri historio de ĉeĥaj-germanaj rilatoj (ing. J. Kříž el Ústí n. L.). Seminarianoj vizitis historian centron en Bramberg, kastelon en Koburg, internacian ekspozicion de moderna vitro en Rosenau, ĝardenojn kaj kastelon en Sanspareil, ekologian centron en akvokastelo de Mitwitz, la groton Sofia kaj pilgrimejon en Gössweistein.

SET Lančov en 1995

1-a etapo 2.7. - 15.7.1995 - E, A, G
2-a etapo 16.7. - 29.7.1995 - E, A, G, F
3-a etapo 30.7. - 12.8.1995 - E, A, G
(A, G ĉefe por infanoj).
Infanoj 6 -10 jaroj: Kč 1.400,-
Infanoj 11-15 jaroj Kč 2.080,-
Ceteraj: Kč 2.280,-
Aĝoj ĝis 15. 1. 1995: Kč 1.980,-
Adreso: Esperanto, 674 01 TŘEBÍČ

MUDr. Josef Hradil kaj Josef Vondroušek

La 22-an de novembro festos sian vivjubileon nia ŝatata doktoro Josef Hradil (* 1924) kaj la 1-an de decembro same estimata Josef Vondroušek (* 1904). Ambaŭ gratulotoj estas sufiĉe konataj en Esperantujo pro sia laboro kaj ne bezonas specialan prezentadon. Nur pro ordo ni rememoru pri Medicina Vortaro kaj bulteno Verda Familio de Josef Hradil kaj pri tradukoj de Josef Vondroušek ("Libro de Apokrifoj", "Rakontoj el unu kaj dua poŝoj", "Milito kontraŭ Salamandroj" de Karel Čapek, "Ondro kaj drako" k.a.)



Kiel ordinare, la malfacilaĵoj de nia asocio provokis niajn plej fidelajn gesamideanojn al donacoj por subteni la asociajn financojn.

La mono ankoraŭ ĉiam alvenas, ĝis la redaktadfermo venis 105 donacoj en suma kvanto ĉirkaŭ 21.000 Kč. La komitato dankas al ĉiuj donacintoj kaj antaŭdankas al donacintoj.

Homonimoj en Esperanto konsiderataj nomenklature

Josef Kavka

Enkonduke

Homonimeco estas lingva okazo, kiam vorto servas por esprimi pluron da nocioj, foje parencaj, foje tre distancaj. Jen fenomeno ĝena por terminologioj kaj nomenklaturetoj. Bedaŭre, neniu lingvo kapablas eviti ĝin, tiom malpli sukcesas ĉi-kampe la planlingvo Esperanto, kies afiksa sistemo evidente kunportas pli oftan koincidon de vortoj etimologie aŭ morfologie malsamaj, sed fakte samformaj (etera, et-era; laŭ-tema, laŭt-ema; alven-dato, al-vendato k.t.p.).

Per ĉi-specaj vortludoj sukcese jonglis **Raymond Schwartz**, sed ni turnu atenton ĉefe al problemoj nomenklaturaj, por respekti la temon indikitan titole.

-OL- kaj -UL-

Kiel unuan problemon tipan por la leksiko de Esperanto, ni esploru koincidon de la radikfina -UL- kun la sufiksa -UL-. Multaj terminoj, kies fina radikparto estas -OL-, povas ekzempli senbazan timon antaŭ homonimeco. Ĉi-speca timo ("fobio") estas dokumentebla jam ĉe la kreinto de Esperanto. Li klopodis eviti konfuzon kun la fundamenta sufikso -UL-, ne hezitate iom misformi fontlingvan aŭ pli internacian terminaspekton. Substrekinde: Ne temas - krom sendanĝeraj esceptoj - pri fakta homonimeco, do tiu de tutaj vortoj.

Jen 18 **fundamentaĵoj** (enkrampe iliaj latinaj ekvivalentoj): fenkolo (*Foeniculum*), frangolo (*Frangula*), karbunkolo (*carbunculus*), kukolo

(*Cuculus*), kupolo (*Cupulla*), lupolo (*lupulus*), muskolo (*musculus*), orakolo (*oraculum*), pilolo (*pilulla*), pirolo (*Pyrrhula* - birdo, *Pirola* - planto), popolo (*populus*), primolo (*Primulus*), ranunkolo (*Ranunculus*), regolo (*Regulus*), skapolo (*scapula*), skatolo (*scatula*), skrofolo (*scrophula*), titolo (*titulus*).

Ni provu esplori, en kiuj okazoj fakte minacus konfuzo pro homonimeco. Ĉu okaze de eventuala "kukulo" - birdo kaj "kukulo" - kuka ulo? Ĉu "lupulo" - planto konfuziĝus kun lupa ulo? Ĉu "muskulo" referencus al muska ulo? Ĉu "orakulo" povus signifi oran kulon? (Cetere, la latina lingvo disponis ankaŭ pri la formo: oraculum, kp. kun la oficiala vorto miraklo el la latina miraculum aŭ miraculum.) Aliflanke pirolo tute superflue produktis la homonimecon de la birdo kun la planto. Popolo spektas neko here ("malplanlingve") kun populacio kaj populara, dum "populo" apenaŭ konfuziĝus kun popa ulo... "Regulo" - birdo kuntekste ne koincidus kun la fundamenta vorto regulo (latina: *regula*), mem homonima kun rega ulo. Skatolo, kvankam kun -o-, tamen homonimas - sendanĝere - kun la fetora substanco (3-metil-indolo). Skrofolo malbone koheras kun skrofulario, planto kuracanta ĝuste la "skroful(oz)on".

La homonim-fobion pro la radika -UL- heredis ankaŭ la kompetentaj posteuloj de *Zamenhof*. Inter la radikoj **oficialaj** troviĝas: ampolo (*ampulla*), garolo (*Garrulus*) kaj tegolo (*tegula*). Da **neoficialaj** PIV-ajoj estas pli: drakunkolo (*dracunculus*), galinolo (*Gallinula*), granolo (= granulo 2), rubekolo (*rubecula*), strangoli (*strangulare*), tragolo (*Tragulus*), unĝolo (*ungula*).

Fine, Esperanta Bildvortaro, restas fidela al la -OL-tradicio, almenaŭ en jenaj du terminoj: kapsolo (*capsulla*) kaj pingikolo (*Pinguicula*). La laste menciita plinto devus nomiĝi pli ĝuste: pingvikulo, por ne misformi la internacie kodigitan nomenklaturaron.

Kontraste, ni atentu la terminojn, kies fina radikparto estas -UL-. Kvan-kam kelk-okaze ili kaŭzas homonim-econ, tamen ili konsistigas la leksikon de Esperanto.

Jen elekto de 13 **fundamentaĵoj**: angulo (*angulus*), betulo (*Betula*), fistulo (*fistula*), gratuli (*gratulari*), inokuli (*inoculare*), insulo (*insula*), kalkulo (*calculus*), kapsulo (*capsulla*), makulo (*macula*), okulo (*ocula*), postulo (*postulare*), spegulo (*speculum*), tabulo (*tabula*).

Okaze de betulo, Zamenhof ne embarasiĝis pro ebla konfuzo kun la fundamenta radiko beto plus la fundamenta sufikso -UL-: li ne enkondukis la misformajon "betolo". Ankaŭ grat- kaj gratul-, kalk- kaj kalkul-, ok-ul- kaj okul-, post-ul- kaj postul- ne ĝenis lin. Ĉi-konekse restos eterna enigmo, kial li intervenis ekz. en la botanikan nomenklaturon, kvankam tute ne minacis homonimeco (kp. la supre menciitajn: fenkolo, frangolo, primolo, ranunkolo k.a.). Nuntempe, la botanikistoj aplikantaj Esperanton pene parkeru, kie restas U (laŭ la latina) kaj kie ili modifu per O.

Nature, ankaŭ inter la radikoj **oficialaj** ekzistas tiuj kun -UL-: cirkuli (*circulari*), formulo (*formula*), kalendulo (*Calendula*), konsulo (*consul*), konvovulvo (*Convovulvus*), modulo (*modulus*), postulo (*postula*), skrupulo (*scrupulus*), stimuli (*stimulare*).

Homonimecoj inter cirk-ul- kaj cirkul-, inter form-ul- kaj formul-, inter mod-ul- kaj modul- estas prave neglekteblaj.

Da **neoficialaj** PIV-aĵoj kun -UL- estas tro multe, por pritrakti ilin ĉi-loke. Ni limigu nin al nomenklaturaroj el botaniko kaj zoologio: asperulo (*Asperula*), aŭrikulo (*Auriculus* - limako, *auricula* - planto), forfikulo (*Forficula*), fraterkulo (*Fratercula*), fuligulo (*fuligula*), galbulo (*Galbula*), guemulo, pli ĝuste: huemulo (*Hippocamelus bisulcus*), inulo (*Inula*), kampanulo (*Campanula*), kerkedulo (*querquedula*), klangulo (*Clangula*), krasulo (*Crassula*), limulo (*Limulus*), luzulo (*Lizula*), mimulo (*mimulus*), opulo (*opulus*), seratulo (*Serratula*), spatulo (*Spatula*), spergulo (*Spergula*), tipulo (*Tipula*).

Memkomprene, sennombraj plant-kaj animal-nomoj, kies radikoj finiĝas je -UL-, ne povis eniri tiaspecan vortaron, kia estas PIV, sed perspektive konsistigos vortarojn specialajn. Por ties aŭtoroj validu la rekomendo, ne misformi -UL- per -OL-, sed respekti la kodigitajn nomenklaturajn, por la bono de Esperanto, kiun la sciencistoj ne konsideru "ĉifra".

Fontoj

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970). - SAT *Paris*.

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Suplemento (1987). - SAT *Paris*.

Esperanta Bildvortaro (1988) R.

Eichholz - *Esperanto-Press, Bailieboro*. Inversa Vortaro de Esperanto (1989).

B.Pabst - Esperanto-Centro, *Paderborno*.

Konferenco de ĈEA

Omaĝe al la 25-jariĝo de nia asocio okazis en Česká Třebová la asocia konferenco en Kultura klubo (5/7-11-199). Partoprenis centoj da gesamideanoj reprezentantaj niajn klubojn kaj rondetojn. En la solena inaŭguro salutis la konerencon urba reprezentanto s-ro Hýbl, operkantisto Miroslav Smyčka akompanate pianne de doc. ovobilský kantis „Tagiĝo“ de A. Grabowski kaj infanoj el Česká Třebová kaj Trutnov prezentis siajn scenetojn. La konferencoj per minuto da silento honoris la forpasintan honoran membron de ĈEA Vuk Ehtner.

Doktoro P. Chrdle rememorigis la 25 jarojn de ĈEA, sukcesojn kaj malsukcesojn, inĝ. V. Kočvara raportis pri la asocia agado dum la lasta jaro, kaj s-ano J. Patera informis pri la financa situacio. Post salutoj de reprezentantino de slovajakaj esperantistoj s-ano Rectorisová kaj Asocio de Esperantistaj Handikapitoj s-ano J. Vaněček estis tralegita letero de Simo Milojevič; la ĝenerala direktoro de UEA senkulpigis sin, ke li ne povis veni al nia konferenco pro okupiteco, kvankam li bezonas trakti kun nia estraro pri organizado de la 81-a Universala Kongreso de UEA en Prago 1996.

Dum tagmeza paŭzo grupo de invititoj vizitis la deponejon de la urba muzeo, kie troviĝas ankaŭ esperantaĵoj (ekz. la praga biblioteko de Šustr) en najbareco de ĉarmaj fokloraj betlehemoj.

Posttagmezo estis dediĉita al diskutantoj, kiuj informis pri la agado de siaj kluboj aŭ sekcioj aŭ invitis al preparataj aranĝoj. La 17-an de decembro 199 realiĝos en Ústí nad Labem la 9-a ĉeĥa-saksa tago (aliĝoj: inĝ. Josef Kříž, Družstevní

11/11, 00 07 ústí n.L.), al UK 1995 en Tampere vojaĝos karavano, estis tra-legita peto de blindula sekcio pri helpo por la gazeto Zora, kiun minacas financa kolapso.

Vesperan programon malfermis recitalo de M. Smyčka (denove kun doc. Novobilský) per famaj arioj, sekvis danc-amuzo kun tombolo.

Dimanĉe antaŭtagmeze oni daŭrigis diskutojn: stato de Esperanto-muzeo en Ĉ. Třebová kaj de SET Lančov, estis rememorigita forpaso de s-ano Chytilová el Přerov la 11-an de aŭgusto 1994, informo pri „Český jazyk“ (Ĉeĥa Lingvo) por 5-a klaso, kie la 31-a paĝo mencias Esperanton, centjariĝo de T. Kilian k.s. Post solena fermo de la konferenco traktis posttagmeze ankoraŭ la asocia Komitato.

En la konferenco aperis novaj publikaĵoj: **Jarlibro de ĈEA 1944** (32 Kč) kaj **Ne nur soldato Ŝvejk** (126,- Kč, 248 p.), rakontoj de Jaroslav Hašek, kaj ankaŭ represo de **Milito kontraŭ Salamandroj** (95 Kč, 197 p.) de Karel Čapek.

- mm -

KLUBA AGADO EN PROSTĚJOV

somere klubano vizitis eŭropan skoltan jamboreon en Nederlando, prezidanto partoprenis MEJS en la germana Triberg; septembre la klubo okazigis prelegojn pri Esperanto en ĉiuj mezlernejoj en Prostějov; en kinejo Metro estis lokita ĝis novembro ekspozicio pri E-korespondado; 12 lernantoj vizitas kurson por komencantoj, 5 por progresintoj; en Olomouc renkontiĝas reprezentantoj de mezmoraviaj E-klubo, por la 20/22-a januaro 1995 la klubo preparas junularan renkontiĝon apud Vsetín.

Esperanto en Universitato

Nove establita trafik-fakultato de Universitato en Pardubice honore al la fama ĉeĥa konstruinto de fervojlinioj Jan Perner preparas por la venontjara signifa datreveno de fervojlinio Olomouc-Pardubice-Prago (150 jaroj) internacian sciencon konferencon kun temo „Nova kvalito en trafiko“ (19/21-09-1995). Krom la kutimaj laborlingvoj oni planas uzi ankaŭ Esperanton. Temoj: trafiko kaj vivomedio, kombinita trafiko, trafik-sistemoj en vartrafiko kaj persontrafiko, trafika infrastrukturo, trafikpolitiko k.s. Ankaŭ la du ceteraj fakultatoj, la kemia kaj ekonomi-administracia, serĉas kontaktojn kun aliaj atlemejoj praktikantaj Esperanton. Informoj petu ĉe:

Trafik-fakultato Jan Perner, strato Studentská 84, 530 09 Pardubice, Ĉeĥio.

(Ing. Z. Polák)

Fervojistaj jarkunvenoj

Banurbo Poděbrady bonvenigis en septembro 1994 jarkonferencon de Fervojista Sekcio de ĈEA, kaj Salzburg gastigis en oktobro jarkonferencon de Aŭstria Fervojista Esperanto-Ligo. Niaj fervojistoj montris al la eksterlandaj amikoj vitrofabrikon BOHEMIA kaj kastelon en Poděbrady, busis al legoma urbeto Přerov n.L. kaj Polaba etnografia muzeo. La aŭstria samideanoj fieris per fervojo de Salzburg al Oberndorf (urbeto, kie naskiĝis la plej fama kristnaska kanto „Stille Nacht, Heilige Nacht“), per pura akvo de Wolfgangsee (120 metrojn profunda lago) kaj per Salzburg, la urbo de Mozart, mem.



KARAVANO AL 80-A UK EN TAMPEREO

ĈEA planas organizi karavanan al 80-a UK en Tampere 22. - 29. 7. 1995. Forveturo la 20-an de julio 1995 per buso. Loĝado estas certigita en somera studenthejmo (la plej avantaĝa eventuale) en trilitaj ĉambroj kun WC kaj duŝo, en la ĉambroj estas glaciŝranko kaj eblo de kuirado. La kongresejo distancas 1.9 km, prezo por unu lito kaj nokto 43 gld inkluzive de matenmanĝo. Laŭ tiuj ĉi kondiĉoj estas kalkuta prezo de la ekskurso (laŭ la nuna kurzo de guldeno) al 11.700 Kč ± 10 %. Enkalkulitaj estas la prezoj de transporto, ekskursoj aranĝataj por partoprenantoj de la karavano, 9 tranoktoj kun matenmanĝo kaj organizaj elspezoj (telefon- kaj faks-tarifoj ktp). **La prezo estas sen kongresa kotizo, (ĉiu pagas memstare)**, ne enkluzivas ekskursojn aranĝataj dum la kongreso de UEA, en enkluzivas asekuron, nek biletojn al ekspozicioj, nek manĝoj krom la menciitaj matenmanĝoj.

Kiu volas partopreni, prefere pagu la kongresan kotizon ĝis fino de novembro 1994 (laŭ malpli altaj tarifoj) pere de nia asocio:

individuaj membroj de UEA: 162 gld., ne membroj: 202 gld.; kunuloj, junularo, handikapuloj - individuaj membroj de UEA: 81 gld., ne membroj :121 gld.

Novaj klubaj adresoj:

Ĉeská Lipa: Kroužek esperanta, Klub důchodců, ul. Bulharská, ĉiujaŭde je la 17-a horo.

Karlovy Vary: kunvenejo en sanatorio IMPERIAL, kuracista libroĉambro, II-a etaĝo, merkrede la 1-an kaj 3-an semajnon en monato je la 19-a horo.

Prostějov: Husovo nám. 85, jaŭde je la 17-a horo.

**Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1**

☆ STARTO ☆

**Periodikum Českého esperantského svazu
Vychází 6x ročně a je určeno členům svazu.**

Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno

Administrátor: Karel Daněk, p. s. 425, 660 25 Brno 2

Evidence a změny adres: Jiří Patera, U Ryšánky 1534, 147 00 Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Aperas 6-foje jare.

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia asocio.

Abonprezo: 15 gld.

Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno

Administrato: Karel Daněk, p. s. 425, 660 25 Brno 2

Ĉeĥa Respubliko

Podávání listovních zásilek povoleno

JmŘS Brno, č. j. P/3-8847/91 ze dne 28. 8. 1991

NOVINOVÁ ZÁSILKA

**Poštovné hrazeno u pošty
664 03 Podolí u Brna**